


La Krokodil'

Informbulteno de Esperanto-Kultur-Centro de Tuluzo

1 rue Jean Aillet, 31000 Toulouse

tel/fax 05 61 25 55 77; courriel :
toulouse@esperanto.org



n°12 - JANUARO 2002

★ Traduko-Semajfino

★ **Vespero kun Abdurahman JUNUSOV**

PRINTEMPA SEMAJNO INTERNACIA

26-a INTERNACIA JUNULARA FESTIVALO

INTERNACIA SEMAJNO EN SÈTE

BAZAJ ESPERANTAJ RADIKOJ

NOVAĴOJ DE NIA BIBLIOTEKO

TRADUKISTOJ SERĈATAJ

NIA KALENDARO

EN NIA REGIONO BALDAŬ OKAZOS:

Traduko-Semajfino 26-27 jan. en Arrout (Ariège)

La propono estas trejni al tradukado de kaj al Esperanto, dum tiu semajfino en Arrout, kun la helpo de Jeannette CASH kaj eble de Rikardo kaj Ch.Lavarenne.

Traduki DE ESPERANTO:

a) literaturon : mi povas disponigi diversajn tekstojn el la franca literaturo jam tradukitajn en Esperanton. Mi proponos ankaŭ facilajn verkojn de Claude PIRON, kaj pli malfacilajn, de Spomenka ŜTIMEC. (Kunportu la lastan numeron de LE MONDE DE L'ESPÉRANTO, kiun vi certe ricevis. En ĝi estas dulingvaj tekstoj.)

b) aliajn tekstojn: mi proponas uzi la diversajn revuojn, MONATO, ESPERANTO, KONTAKTO, aŭ librojn kiel : HOMAJ RAJTOJ (el Unesco), SPITE AL ĈIO BOSNIO (politiko), LA RONDO FAMILIA (sociologio), ktp.

Traduki AL ESPERANTO:

Ni povas uzi la samajn francajn literaturaĵojn, jam tradukitajn en Esperanto. Aŭ provi viajn ĉatatajn romanojn. Por ne-fikciaj tekstoj tradukotaj al Esperanto, mi proponas ekonomikajn tekstojn el asocio ATTAC, aŭ simple elekti artikolojn el gazetoj.

Estus laŭ mi prefere komenci per traduko de esperanto al la franca, kaj poste en la alia direkto.

Ĉiuokaze, mi bezonas scii rapide kiuj intencas partopreni tiun semajfinon, por bone organizi ĝin.

La aliĝotizo estos sama kiel kutime. (200 FF = 30,50 € por la tuta semajfino, au 140 FF= 21,34 € por studentoj kaj senlaboruloj).

Listo de haveblaj francaj literaturaĵoj tradukitaj en esperanto

Beaumarchais: EDZIDĜO DE FIGARO

Beaumarchais: BARBIRO DE SÉVILLE

Cocteau: LA HOMA VOĈO

Courteline: KOMEDIOJ

Daudet: LETEROJ EL MIA MUELEJO

Flaubert: prozo ?

Guilleragues: PORTUGALAJ LETEROJ

Victor Hugo: ANGELO

Mérimée: LOKIS

Molière: NOBELA BURĜO

Montesquieu: PERSAJ LETEROJ

Racine: ANDROMAKA

Supervielle: RAKONTOJ

Vespero kun Abdurahman JUNUSOV kaj regalado per Reĝkuko

Vendredon 1-an de februaro, je la 20-a 30, 9 rue Marengo (ĉe la fervojistoj)

La fervojista grupo kaj EKC invitas vin al festa kaj kultura vespero kun ĵurnalisto el Dagestano (kaŭkaza lando, apud Ĉeĉenio). Okaze de sia prelegturneo en Francio, A. JUNUSOV prezentos al ni sian landon, kaj respondos niajn demandojn. Li parolos en Esperanto.

La dua parto de la vespero, dum kiu ni povos daŭrigi la diskuton, estos la tradicia Reĝkukoj, preparitaj de la fervojistoj. Financa partopreno por la kostoj: 3 €.

Enskribiĝu telefone al Josée Lafosse: 05.61.24.14.45, kaj diru al ŝi ĉu vi deziras vespermanĝi en la fervoja restoracio.

LE DAGUESTAN

LA MONTAGNE DES LANGUES

ESPERANTO-KULTUR-CENTRO et les CHEMINOTS TOULOUSAINS POUR L'ESPÉRANTO vous invitent à une soirée animée par le journaliste daguestanais Abdourakhman IOUNOUSSOV

En français, nous écrivons le DAGUESTAN ou le DAGHESTAN. Un choix linguistique, comme pour illustrer la diversité des langues et des cultures d'un pays, comme pour souligner aussi nos incertitudes, notre méconnaissance de ce territoire, dont on parle peu, que nous situons avec difficulté sur la carte.

Le Daguestan, 50.000 km², 2 millions d'habitants, est un pays de plaines et de hautes montagnes creusées de vallées étroites et profondes où s'est réfugiée une mosaïque de peuples de langues (plusieurs dizaines) et de cultures très variées.

Le Daguestan, au bord de la mer Caspienne, est une République de la Fédération de Russie, voisine de la Tchétchénie, où l'Islam est la religion la plus pratiquée.

DAGESTANO :

[Vladimir Bobrovnikov Quel avenir pour le Daghestan ? Projets et réalités.](#)

Abdourakhman IOUNOUSSOV

Il est né en 1948 à Kumuh, un village de montagne au centre de la région des Lakhs, une des très nombreuses nationalités du Daguestan. Après des études littéraires à l'Université de Makhatchkala, la capitale, il a travaillé plus de vingt ans comme journaliste, puis rédacteur en chef à la télévision daguestanaise, plus particulièrement chargé du secteur culturel et artistique. Iounoussov a également été rédacteur en Belgique et en Hongrie pour des revues éditées en espéranto. Il dirige maintenant un hebdomadaire indépendant diffusé sur le Daguestan. Abdourakhman Iounoussov, qui entretient des liens d'amitié avec Nicolas Ebnother, journaliste à Paris a beaucoup aidé celui-ci pendant la préparation de son reportage sur le braconnage de l'esturgeon et le trafic de caviar, diffusé sur FR3 au cours de l'émission THALASSA, en décembre 2001.

Abdourakhman Iounoussov est invité par l'association nationale " France Espéranto " pour une tournée de conférences sur le Daguestan qui le mènera dans 18 villes françaises.

OKAZOS EKSTER NIA REGIONO:

PRINTEMPA SEMAJNO INTERNACIA, 29/03 -05/04, Germanio

La 18a P.S.I. okazos en WALDFISCHBACH, de 29 marto ĝis 5 aprilo 2002.

En tiu aranĝo speciale celanta familiojn, oni atendas pli ol 160 partoprenantojn, el pli ol 15 landoj.

La aliĝkotizo estas 245 € por plenkreskulo kaj inkluzivas loĝadon, tri manĝojn tage, kaj endoman programon. Estas rabatoj laŭaĝaj por infanoj, kaj senpage por la tria infano de familio! Ankoraŭ eblas ĝui rabaton de 10 €, se oni aliĝas antaŭ la 31a de januaro.

Pli da informoj : www.esperanto.de/psi

Eblas atingi trajne WALDFISCHBACH-BURGALBEN, kiu situas sur fervoja linio de Kaiserslautern al Pirmasens., 20 km for de la franca landlimo.

De Tuluzo, la vojaĝo per trajno daŭrus proksimume 12 horojn kaj kostus po 850/900 frankoj. Forir-horo de Tuluzo: 06h03 au 23h13 (verŝajne).

Pri nia projekto komune vojaĝi al ĉi tiu aranĝo, venis la momento deklari sian intereson, eĉ se ankoraŭ ne definitivan, por la propono.

Interesuloj kontaktu EKC-n antaŭ la fino de januaro.

26-a INTERNACIA JUNULARA FESTIVALO 27/03 – 02/04/2002 Italio

La 26a Internacia Junulara Festivalo okazoj en FENESTRELLE (apud Torino, Piemonte, Italio), en luksa ĵus renovigita hoteleca gastejo, sur flanko de montara valo.

La temo estos "Integrado de minoritatoj en Eŭropo de eŭro".

Aliĝkotizoj (entenas programon, tranoktojn kaj ĉiuj manĝojn, sed ne litotukojn):

de 127 ĝis 170 € por junuloj sub 30 jaroj, de 159 ĝis 191 por pliaĝuloj.

TTT-pagoj : www.esperanto.it/iej/ijf/2002

*Plenkolora **afiŝo**, eldonita de BEMI (Bicikla Esperanto Movado Internacia) kiu reklamas biciklan karavanon al Fenestrelle, estas havebla en esperanto aŭ en la franca. Vi povas ricevi ĝin (A3 au A4) kontraŭ la kosto de la fotokopiado.*

INTERNACIA SEMAJNO EN SÈTE 24 - 31/08 (Francio)

En Sète okazos la 28a internacia semajno de Esperanto. Sète estas urbo ĉe franca mediteraneo proksime de Montpellier. Ĉijare la staĝo daŭros de la 24 a ĝis la 31 a de aŭgusto 2002. La lernantoj povos elekti inter 3-nivelaj kursoj gvidotaj de diversdevenaj personoj. La kursoj okazos matenon kaj finon de posttagmezo. La kursejo estas agrabla, oni povos loĝi en unulita aŭ dulita dormo-ĉambro meze de granda parko de pinarboj kun privata vojeto aliranta la strandon.

ESPÉRANTO CULTURE ET PROGRÈS

5, rue du docteur Roux
30090 MONTPELLIER
tel : 04 67 54 15 43

yvierne@netcourrier.com

nikolao.k@wanadoo.fr

DIVERSAJHOJ :

Nova vortaro : BAZAJ ESPERANTAJ RADIKOJ

aperis ĉe UEA (prezo : 7,50 €).

Temas pri listo de ĉirkaŭ 2 700 Esperanto-radikoj kun klarigoj per kiel eble facilaj kaj kutimaj Esperanto-vortoj, kiu jam dum kelkaj jaroj troviĝas en la reto, kaj tie estas konsultata dekojn da fojoj ĉiutage. Ĝi estas taŭga por homoj kiuj volas pensi rekte en Esperanto.

LA BAZAJ RADIKOJ : [Latin3](#) [Unikode](#) [Ĉapelite](#)

NOVAJHOJ DE NIA BIBLIOTEKO

En 2001 nur 7 personoj pruntis librojn, La bibliotekisto invitas al pli da libropruntoj, kaj memorigas, ke la biblioteko ricevas (pli malpli regule) jenajn periodaĵojn :

PERIODAJHO	TIPO	PERIODAJHO	TIPO
KANCERKLINIKO, LA	kultura, avangarda, internacia	DOMO, LA	komerco kaj tekniko
KONTAKTO	diverstema, junulara	FAMILIA ESPERANTO	pri esp.istaj familioj
INTER NI	el Malagasio	INFANA BABILEMO SENLIMOJ	por junaj infanoj
JEUNESPÉRANTO INFO	nacia, Espéranto-Jeunes	SUDFRANCIA STELO	federacio Languedoc
INFORMA BULTENO	grupa, el Bologna, Italio	KONCIZE	Junuloj de Eŭr.Unio
ESPÉRANTO PYRÉNÉES	loka, federacio	TEJO TUTMONDE	Organo de TEJO
MONATO	ĝeneraltema, internacia	ESPERANTO-FERVOJISTO	nacia organo
BOSNIA LILIO	nacia,el Bosnio	HEROLDO DE ESPERANTO	organo de la Civito
KOMENCANTO, LA	facilaj legaĵoj, el Rusio	LE MONDE DE L'ESPÉRANTO	organo de U.F.E.
ESPERANTO	organo de UEA, internacia	NORD-GAZETO	nordfranca federacio
ROK-GAZET	muzika	ESPÉRANTO-INFO	franclingva informilo
		EVENTOJ (RETA GAZETO)	pri esperanto movado

TRADUKISTOJ SERĈATAJ

Nous avons été informés par le Centre Toulousain du Volontariat, dont nous sommes membres, que le Comité Médico Social pour la Santé des Migrants recherche des interprètes bénévoles, pour compléter ses équipes, dans les langues :

des pays d'Europe Centrale, d'Asie, d'Afrique subsaharienne.

Si vous pensez pouvoir les aider, contactez :

CMSSM (Mme Aimée Kimpiobi)
2 cheminement R. Cambert
31100 Toulouse
Tel/Fax : 05 61 44 87 94

NIA KALENDARO

Jan

26-27 Arrout-semajnfino

Fev

. 01 Reĝkuko kun A. JUNUSOV ĉe la fervojistoj

08 Manĝo-Klaĉo ĉe EKC

Mar

01 Manĝo-Klaĉo

16-17 (ou 23-24) Arrout-semajnfino

Apr.

05 Manĝo-Klaĉo

Maj

03 Manĝo-Klaĉo

04-05 Arrout-semajnfino

Jun.

07 Manĝo-Klaĉo